061.22(ISAE).055.5„1957"

RAPORTO

pri la agado de ISAE dum la jaro 1957

La *Estraro* konsistis el: prof. S. Nishi — prezidanto, C. Støp-Bowitz kaj G. F. Makkink — vicprezidantoj, prof. B. Popoviĉ — ĝenerala sekretario, d-ro D. Brkiĉ — sekretario-kasisto, prof. H. Sirk kaj inĝ. R. Haferkorn.

En la *Komitato* estis (krom la estraranoj): d-ro P. Neergaard (Danlando), d-ro K. Dellian (Germanujo), prof. U. Pesonen (Finnlando), prof. M. Fréchet (Francujo), inĝ. A. Warner (Germanujo), inĝ. S. Alexandersson (Svedujo), d-ro I. Lapenna (Informa sekcio), d-ro W. P. Roelofs kaj d-ro G. Hamming (la redaktoroj). En kelkaj landoj denove mankis la komitatanoj kaj ni devos speciale zorgi ke dum novaj elektoj ankaŭ ili elektu komitatanojn.

Landaj sekcioj ekzistis en Britujo, Germanujo, Japanujo, Jugoslavio kaj Nederlando. Krome estis delegitoj en Argentino, Aŭstrujo, Brazilo, Danlando, Finnlando, Hispanujo, Italujo, Meksikio, Norvegujo, Novzelando, Svedujo, Urugvajo kaj Usono. Perantojn ni havis en Belgio kaj Francujo. La franca peranto fine de la jaro demisiis pro troaj ŝarĝoj en E-movado kaj la problemo de la francaj membroj akriĝis tiom ke oni devas serĉi profundan solvon, restarigi iaman tre grandan filion de ISAE en Francujo. Post interkonsento kun la eldonisto sendi la revuon al ĉiuj landoj, oni daŭrigis la kontakton kun la novaj delegitoj en Ĉeĥoslovakio, Pollando kaj Sovetunio kaj ili ekfunkcios por la jaro 1958. En Usono estis fine de la jaro elektita nova delegito. En Svedujo estas ŝanĝita la delegito interkonsente kun la malnova delegito.

En 1957-a jaro ISAE havis entute 425 membrojn en 22 landoj, nome: Argentino 4, Aŭstrujo 25, Belgio 4, Brazilo 2, Britujo 70, Danlando 16, Finnlando 11, Francujo 40, Germanujo 49, Hispanujo 14, Islando 1, Italujo 15, Jugoslavio 41, Japanujo 17, Kanado 1, Meksikio 10, Nederlando 47, Norvegujo 15, Novzelando 4, Svedujo 8, Urugvajo 5, Usono 20, rekte ĉe la eldonisto kaj pere de UEA 6. Pri Danlando, Finnlando, Francujo, Italujo, Japanujo kaj Nederlando la nombroj ne estas certaj ĉar la delegitoj kontaktis senpere kun la eldonisto, ne informinte la sekretariejon. Nepre necesas ke en la nova jaro oni ordigu la administradon ankaŭ kun ĉi tiuj delegitoj.

La *sekretariejo* (Sarajevo — B. Popoviĉ kaj D. Brkiĉ) ricevis 78 korespondaĵojn kaj forsendis 111 leterojn kaj 5 cirkulerojn. Krome por *Sciencaj Studoj* ricevitaj 52 korespondaĵoj kaj forsenditaj 18 leteroj kaj 96 presaĵoj. La *Terminologia sekcio* (R. Haferkorn) funkciis regule, financate de la germanaj membroj. Ĝi kunlaboris kun la *Akademio de Esperanto* en preparoj de la *Plena Ilustrita Vortaro* (redaktado de la teknika parto). Elekto de la sekcia gvidanto kiel membro de la Akademio estas honoro ankaŭ por ISAE.

La eldona aktiveco. Scienca Revuo aperis kun 2 numeroj el la antaŭa jaro kaj nur 1 numero el la jaro 1957, tiel pligrandiĝis la malfruo. La neregula aperado kaŭzis multajn plendojn, membroperdojn kaj malpligrandiĝon de influo de ISAE. Dum la kongreso 1958 oni devas nepre trovi iun solvon kiu garantios pli regulan kontakton inter la Estraro kaj la membroj de ISAE.

Sciencaj Studoj estas preskaŭ pretaj por dissendo. Ioman prokraston kaŭzis presejo, pro manko de specialaj sciencaj signaĵoj. La redaktoro, d-ro Neergaard, kaj la kasisto, s-ro Jørgensen, havis (krom la sekretariejo) grandan laboron por *Sciencaj Studoj* kaj ili meritas nian dankon. Venis (en rondaj ciferoj) 250 rektaj antaŭmendoj, 120 antaŭmendoj pere de la delegitoj aŭ kun postpago, kaj 150 antaŭmendoj kun kredito (el landoj sen libera monŝanĝo).

La bibliotekon transprenis s-ro H. de Caspary (Norvegujo) kiu ordigos ĝin kaj poste disponigos ĝin al la membroj.

La jarkunveno okazis en Marsejlo (Francujo). Krom diskutoj pri la raportoj, la jarkunveno fiksis novajn, pli altajn, kotizojn por la jaro 1958, tiel ke la eldonisto ne plu perdu kaj ISAE havu pli fortajn proprajn financajn rimedojn. Por studentoj kolektive aliĝantaj oni fiksis pli favoran kotizon. Krome la jarkunveno decidis ree organizi la *Tradukan Servon de ISAE*. La ĉefa punkto de la jarkunveno estis la reorganizo de ISAE pli sur faka bazo. La jarkunveno starigis la principojn, laŭ kiuj la Estraro preparis la novan *Statuton*, pridiskutis ĝin perletere kaj submetos ĝin al la referendumo de la membroj.

La dua kunveno en Marsejlo pritraktis la problemon de la *„Centro por Internaciaj Kulturaj Interŝanĝoj" (CIKI)*. Oni decidis starigi la centron kaj trovi konvenan personon por ĝia gvidado. La tasko de CIKI estas precipe plifaciligi trafikon de esperantaĵoj inter la landoj kun libera kaj nelibera monŝanĝo, per multflanka kreditado.

La Komitato de UEA akceptis ISAEn kiel (la unuan) aliĝintan fakan asocion — membron de UEA. ISAE kunlaboris en la preparoj kaj la laboro de la dua kongresa sekcio *„Internacia lingvo en scienco kaj tekniko"*, kie la ĝenerala sekretario de ISAE faris la enkondukan raporton. La rezolucio de la sekcio estas publikigita en *Scienca Revuo* (La Estraro).

061.22(ISAE).053.7„1958.08.04"(43-2.48)

PROTOKOLO

de la jarkunveno de ISAE, 1958

La jarkunveno okazis 4.8.1958 en Mainz (Okc. Germanujo) en la kadro de 43a Universala Kongreso de Esperanto. Partoprenis ĝin 48 membroj el 12 landoj. La jarkunveno komenciĝis je 14h.12m.

La jarkunvenon malfermis kaj prezidis la estrarano de ISAE inĝ. R. Haferkorn. La ĝenerala sekretario proponis la jenan tagordon:

1. Malfermo de la jarkunveno.
2. Raporto de la Estraro por la jaro 1957.
3. La ekonomia raporto 1957.
4. La raporto pri la fondaĵo „Scienco".
5. Diskuto pri la raportoj.
6. Absolvo de la Estraro 1957.
7. Diskuto pri la oficiala organo de ISAE.
8. Sugestoj por la estonta laboro (precipe de la filioj kaj de la centroj).
9. Fermo de la kunveno.

2—6. La ĝenerala sekretario tralegis la jarraporton kaj la ekonomian raporton kaj informis ke la tuta, ankoraŭ malgranda, havaĵo de la fondaĵo *„Scienco"* estas pruntedonita por *„Sciencaj Studoj"*, ĝis ilia disvendo.

Post nelonga diskuto la raportoj estas aprobataj kaj la Estraro absolvata por la laboro en la jaro 1957, kun dankesprimo por tiu laboro.

7. Haferkorn klarigas ke la nereguleco de la aperado de *Scienca Revuo* devigas nin starigi tre serioze la demandon pri la oficiala organo de ISAE. Ciliga informas ke li kaj aliaj ne povis aboni la revuon pere de la centro en Francujo kaj ke ĝi venadas tre sporade. Li proponas ŝanĝi la eldoniston, kiu estas superŝutita per aliaj laboroj. Sirk volas ne serĉi alian eldoniston (riska afero), sed esplori la kaŭzojn. Roelofs parolas pri multaj malbonaj manuskriptoj, lingve eĉ fuŝaj. Krome li klarigas ke la malfruo okazis precipe pro kelkaj ŝanĝoj de la redaktoroj dum la demisio de s-ro Makkink pro malsano. Lastatempe ankaŭ la kompostisto estis malsana. Li klopodos reguligi la aperigadon ĝis komenco de la nova jaro, sed li ne povas kompromisi pri la lingva nivelo kaj li bezonas helpon, almenaŭ por la indekso. S-ino v. d. Boogaard informas ke la malfruon ne kulpas la eldonisto. Haferkorn estas por la *„Bulteno"* kiel la konstanta ligilo inter la membroj.

En la diskuto oni esprimis la deziron ke unu sola homo respondecu pri la redaktado, ke oni trovu helpon por la indekso, ke oni gardu la lingvonivelon kaj resendadu al la aŭtoroj lingve tre malbonajn manuskriptojn kaj ĉiam havu antaŭ la okuloj ke la revuo devas esti la regula kontaktilo inter la membroj kaj la Estraro.

La decido: Per la kongresa materialo kaj per la prelegoj de ISU rapide eldoni la n-ojn 2, 3, 4 por ĉi tiu jaro kaj jam venontjare regule aperigadi la revuon.

8. La ĝenerala sekretario informas ke la kontakto inter la filioj kaj la Estraro estas ankoraŭ nekontentiga kaj ke ĝi devas esti pli regula, eĉ kiam la landaj filioj nemulte funkcias en sia interna vivo. *Terminologia Centro* funkcias, sed la *Traduka Servo* kaj *CIKI (Centro por Internaciaj Kulturaj Interŝanĝoj)* ankoraŭ ne. Oni eble povas unuigi la lastajn du en la sama persono de Hanuŝ, kiu jam akceptis transpreni la gvidadon de la *Traduka Servo*. Smith opinias ke la *Traduka Servo* devas esti organizata pli bone kaj pli rapide.

Post la diskuto oni decidis starigi la traduktarifon, ebligi la tradukojn en Esperanton kaj pere de Esperanto kaj pri la agadmaniero de la *Traduka Servo* informi per la artikolo en la plej gravaj revuoj.

La prezidanto fermis la kunvenon je 15h.55m.

Protokolis
la ĝen sekretario
prof. B. Popoviĉ

061.22(ISAE) : 655.4

POPULARSCIENCA BIBLIOTEKO DE ISAE

(Enkondukaj vortoj por la diskuto en la larĝa kunveno de ISAE dum la 43-a Universala Kongreso, Mainz, 1958)

Jam multo estas sur scienca kampo aperigita ĝis nun en esperanto. Oni povas dividi tiujn presaĵojn en 3 grupojn: 1. originalajn sciencajn esplorojn el diversaj branĉoj en diversaj altsciencaj revuoj aperigitaj komplete aŭ resume en esperanto; 2. la revuojn aperigitajn parte aŭ tute en esperanto, kaj 3. popularsciencajn aŭ fakajn librojn.

Oni ne disponas pri biblografioj de ĉio aperigita en ĉiuj tri grupoj. Tiun taskon starigis la pasintjara kongreso (en sia dua kongresa sekcio) antaŭ landaj grupoj de scienculoj-esperantistoj. Sed kiam oni provas almenaŭ parte sumigi la faritan, oni nur tiam bone vidas ke ni ĝis nun atingis multe pli ol ni mem opinias.

I

Prenu la unuan grupon. Oni disponas nur pri, kiel ŝajnas, kompleta bibliografio de sciencaj kaj medicinaj verkaĵoj aperigitaj en Japanujo aŭ de japanoj. La bibliografio mencias preskaŭ 400 artikolojn aperigitajn plene en esperanto kaj multe pli ol mil parte aŭ resume en esperanto. En la tuta mondo certe estas aperigitaj kelkoble tiom da artikoloj.

Sed la perlo de ĉiu tiu publikigado estas la unua kolekto de originalaj sciencaj artikoloj aperigita pure en esperanto kaj de esperantistoj mem. Tio estas *„Sciencaj Studoj"*, aperigitaj en ĉi tiu jaro, kompre-